


double

Ilustrita Lernolibro de Esperanto

por
Praktika Komencna Kurso
de
Delfi Dalmau, L. K.



L 447

Nova eldono plibonigita laŭ internacia kritiko kaj recenzo

APART. 5081
BARCELONA
1938



UNUA LECIONO

(Por rakonto aŭ priro, lego kaj legigo, kaj skribigo):

La ĉielo (10) estas blua; la maro (11) ankaŭ estas blua. La ĉielo kaj la maro estas bluj. La papero (3) kaj la pordo (4) estas blankaj. La libro (1) ne estas blanka; la plumingo (2) ankaŭ ne estas blanka: la libro kaj la plumingo estas ruĝaj. La tablo (13) ne estas ruĝa, sed griza. La benko (6) estas flava, kaj la seĝo (7) estas ankaŭ flava. La folio (9) estas nek flava nek blanka, sed verda; la muro (8) estas ankaŭ verda: la folio kaj la muro estas verdaj.

Sur la tablo estas libro, papero, plumingo, kraĵono (12) kaj inkujo (5). En la inkujo estas inko. La inko estas nigra. La libro kuŝas sur la tablo. La seĝo ne kuŝas, la seĝo staras. La benko ne staras sur la tablo, ĝi staras sur la planko. La tablo ankaŭ staras sur la planko. La planko estas

nek blua, nek verda, nek griza, nek flava: ĝi estas kaŝtankolora. La benko kaj la seĝo, kiuj estas flavaj, staras apud la kaŝtankolora muro. Sur la ilustrita paĝo estas du muroj: unu kaŝtankolora kaj la alia, verda.

La numeraloj en Esperanto estas unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek. Dek estas skribata per unu kaj nulo: 10. Speciala nomo estas ankaŭ por 100: cent; por 1.000: mil.

11 estas dek unu; 12, dek du; 13, dek tri; 24, dudek kvar; 25, dudek kvin; 36, tridek ses; 37, tridek sep; 48, kvardek ok; 59, kvindek naŭ; 60, sesdek; 71, sepdek unu; 82, okdek du; 93, naŭdek tri; 104, cent kvar; 1937, mil naŭcent tridek sep.

EKZERCOJ

(Por respondado, kompletigo, interparolado, legigo kaj skribigo)



Kio estas blua? — La ĉielo estas blua. — Kio estas blanka? — La pordo estas blanka? — Jes, ... — Ĉu la papero estas blanka? — Jes, ... — Ĉu la maro estas blua? — Jes, la ... — Kio estas ruĝa? — La plumingo kaj la libro ... ruĝaj. — Kio estas griza? — ... — Ĉu la planko estas griza? — Ne, ĝi ne ... : ĝi estas kaŝtankolora. — Ĉu la folio estas blanka? — Ne, ĝi ne estas blanka, sed verda. — Ĉu la seĝo kaj la benko estas kaŝtankoloraj? — Ne, ili estas flavaj; ili ne estas kaŝtankoloraj. — Kiakolora estas la muro numero 8? ... — Kio estas sur la tablo? — Sur la tablo estas ruĝa libro, ruĝa plumingo, blanka papero, inkujo kaj krajono. — Kio estas en la inkujo? — Inko, estas en ĝi. — Ĉu la libro kuŝas sur la planko? — Ne, ĝi kuŝas sur ... — Kio kuŝas sur la planko? — Nenio kuŝas sur la planko. — Kio staras sur la planko? — Tablo, seĝo kaj benko staras sur la planko. — Ĉu la papero kuŝas aŭ staras? — Ĝi kuŝas. — Ĉu la plumingo staras? — Ne, ĝi ne staras, ĝi kuŝas. — En kio estas inko? — En inkujo. — Sur kio kuŝas la papero? — Ĝi kuŝas sur la tablo. — Sur kio staras la tablo? — Ĝi staras ... — Ĉu la seĝo kaj la benko staras apud la pordo? — Ne, ili ... la kaŝtankolora ... — Sur kio estas la cifero ok? — Ĝi estas sur la verda muro. — Sur ... tri? — Ĝi ... la papero. — Kiu numero estas sur ...? — La numero unu ... la libro. — Kiu numero estas sur ...? — Sur ĝi estas ... ses.

SUBSTANTIVOJ:

libro, seĝo,
plumingo, numero,
papero, paĝo,
pordo, leciono,
inko, inkujo, ktp.

ADJEKTIVOJ:


ruĝa, blanka,
flava, unua,
blua, nigra,
kiakolora,
skribata, ilustrita.

PRONOMOJ:

ĝi,
ili,
kio,
kiu,
nenio.

VERBOJ:

estas,
kuŝas,
staras,
skribata,
ilustrita,



DUA LECIONO

(Por rakonto aŭ pridiro, lego kaj legigo, kaj skribigo):

En la klaso (4) estas instruanto (3) kaj lernantoj. Unu lernanto (1) staras antaŭ nigra tabulo, kaj skribas per blanka kredo. La aliaj lernantoj kaj la instruisto (3) sidas. La instruisto (instruanto) estas sinjoro Cezaro Bosko. La lernantoj ne estas maturaj homoj, sed knaboj. Mia fratino estas knabino (2). Mia patro estas matura homo (5). Mia avo estas maljuna sinjoro (7). La avino estas maljuna sinjorino (8). La patro (5), la patrino (6), la filo (1) kaj la filino (2) ne estas maljunaj; ili estas junaj. La patrino kaj la avino ne estas en la klaso, sed en la hejmo. En la hejmo de mia onklo

estas tri knabinoj, kiuj estas miaj kuzinoj, ĉar ili estas la filinoj de la frato de mia patro. Fratino de mia patro aŭ de mia patrino estas mia onklino. Patro kaj patrino estas gepatroj. La gepatroj de mia patro kaj tiuj de mia patrino, estas miaj geavoj.

Mi estas lernanto de mia instruanto (instruisto), filo de miaj gepatroj, nepo de miaj geavoj, nevo de miaj geonkloj, kuzo de miaj gekuzoj. Miaj gefratoj kaj gekuzoj estas junaj; miaj gepatroj kaj geonkloj estas mezaĝaj, kaj miaj geavoj estas maljunaj. Miaj kuzinoj estas nevinoj de miaj gepatroj. En granda familio estas multaj parencoj.

Instruantoj instruas, lernantoj lernas, kantantoj kantas, oratoroj paroladas, infanoj ploras kaj ridas.

En lernejo estas libroj por legado; kaj plumoj, inko, kraĵonoj kaj kajeroj por skribado.

VERBO:

Sing.: Mi skribas, vi skribas, li aŭ ŝi skribas.

Plur.: Ni skribas, vi skribas, ili skribas.





EKZERCOJ

(Por kompletigo, respondado, interparolado, legigo kaj skribigo):

Kiu estas en la klaso? — Instruisto kaj lernantoj estas ... — Kiu estas en la hejmo? — La familio estas en ... — Kiu staras en la klaso antaŭ la nigra tabulo? — Lernanto staras antaŭ ... — Ĉu la instruanto staras aŭ kuŝas en la klaso? — Ne, li nek staras nek kuŝas, li sidas. — Ĉu vi estas sinjoro Cezaro Bosko? — Ne, mi ne estas sinjoro C. B. — Kiu estas vi? — Mi estas Petro Roig. — Kiu estas la instruanto? — Li estas Sro. Cezaro Bosko. — Kiu estas via avino? — Mia avino estas la patrino de mia patro aŭ tiu de mia patrino. — Ĉu vi estas patro de via patro? — Ne, sinjoro, mi estas ... de mia patro. — Kiu estas via kuzo? — Filo de miaj geonkloj estas mia ... — Kiu estas via onklino? — Fratino de mia patro aŭ de mia patrino estas ... — Ĉu vi estas maljuna? — Ne, sinjoro; miaj geavoj ... ; mi estas juna. — Ĉu viaj gepatroj estas junaj aŭ maljunaj? — Ili estas mezaĝaj. — Kiu lernas? ... — Kiu instruas? — ... — Ĉu oratoroj ploras? — Ne, sinjoro; oratoroj paroladas; infanoj ... — Por kio estas libroj? — Ili estas por legado kaj studado. — Kio estas por skribado? ... — Ĉu vi estas juna aŭ maljuna persono? ...

Instrui, lerni, skribi, legi, paroli, stari, sidi, kuŝi, esti, vivi, morti, estas VERBOJ.

Granda, malgranda, bona, malbona, multaj, malmultaj, juna, maljuna, estas ADJEKTIVOJ.



TRIA LECIONO

(Por rakonto aŭ pridiro, lego kaj legigo, kaj skribigo):

Matene, la suno (1) aperas aŭ leviĝas en la oriento. Tagmeze, la suno (2) estas super ni aŭ en la sudo. Vespere, la suno (3) iris al la okcidento. La suno ne estas videbla dum nokto (12). Dum nokto, ni dormas; dum tago ni studas aŭ laboras. Lundo, mardo, merkredo, ĵaŭdo, vendredo, sabato kaj dimanĉo estas la sep tagoj de semajno. Jaro konsistas el tricent sesdek kvin tagoj. La kvaraj jaroj: —4, —8, —12, —16, —20, —24, cetere, estas nomataj superjaroj, ĉar tiam la monato februaro havas dudek naŭ tagojn, kaj tial ĉiu kvara jaro havas tricent sesdek ses tagojn: unu pli ol la tri aliaj jaroj. Januaro estas la unua monato; februaro, la dua;

marto, la tria; aprilo, la kvara; la ceteraj monatoj estas majo, junio, julio, aŭgusto, septembro, oktobro, novembro kaj decembro: do, decembro estas la lasta, kaj novembro la antaŭlasta. Kiu estas la lasta tago de semajno? En kelkaj landoj oni diras ke la lasta semajnotago estas sabato, kaj en aliaj landoj dimanĉo estas konsiderata la lasta. Dum unu tago kaj nokto estas dudek kvar horoj dividitaj je mateno, tagmezo, posttagmezo kaj nokto. Matene, je unu kvarono antaŭ la sepa (8) mi (10) leviĝas el la lito. Nokte, mi iras dormi. Dum mi dormas, mi ripozas. Laborado lacigas, kaj dormado ripozigas. Laŭ la unua horloĝo (4) estas la deka horo; la horloĝo numero 5 montras la dekan horon kaj dudek minutojn. La dek-dua horo estas tagmezo aŭ noktomezo.—Kioma horo estas nun?

Nun, kiam mi lernas Esperanton, estas kvarono post la sepa horo vespere. La suno aperas oriente, kaj kaŝiĝas okcidente. Mi ellitiĝas matene kaj kuŝiĝas vespere. La suno leviĝas en mia lando, Katalunujo, je la kvina aŭ la sesa horo matene; mi leviĝas pli malfrue, je la sepa aŭ la oka. La suno kaŝiĝas aŭ malleviĝas vespere je la sepa; mi kuŝiĝas pli malfrue, je la deka. Mia patrino leviĝas aŭ ellitiĝas pli frue ol mi, je la sesa kaj duono matene. Matene, la suno leviĝas aŭ aperas. Vespere, ĝi malleviĝas aŭ kuŝiĝas aŭ malaperas aŭ kaŝiĝas.

EKZERCOJ

(Por respondado, interparolado, legigo kaj skribigo):





Kiom da tagoj havas ordinara jaro? — Ordinara jaro havas 365 tagojn. — Kiel estas nomata jaro kiu havas 366 tagojn? — Ĝi estas nomata superjaro. — Ĉu vi leviĝas matene aŭ vespere? — Ĉu via frato leviĝas pli frue aŭ pli malfrue ol la suno? — Je kioma horo kuŝiĝas la suno en via lando? — Ĉu vi laboras nokte aŭ tage? — Ĉu vi dormas tage aŭ nokte? — Ĉu en via lando, nun, nokto estas pli longa ol tago? — Ĉu semajno estas pli longa ol monato? — Kiom da kvaronoj havas horo? — Horo havas kvar kvaronojn aŭ du duonojn aŭ sesdek minutojn. — Ĉu vi havas multajn gefratojn? — Kiom da instruantoj estas en la klaso? — Kiom da tagoj havas superjara februaro? — Superjara februaro havas 29 tagojn. — Ĉu vi havas multajn Esperantajn librojn? — Kiam leviĝas la suno? — Ĝi aperas matene. — Kiam ĝi kuŝiĝas? — Kiam vi laboras? — Kiam vi dormas? — Kie estas la suno? — Matene ĝi estas oriente, tagmeze ĝi estas sude kaj vespere ĝi estas okcidente. — Kie vi dormas? — en lito. — Kie vi manĝas? — en manĝoĉambro. — Kie estas lito? — Ĝi estas en dormoĉambro. — Kiam aperas la suno? — Kiam ĝi kaŝiĝas aŭ malaperas?

KIAM?: frue, malfrue, matene, tage, posttagmeze, vespere, nokte, antaŭe, poste, unue, laste, tiam, ĉiam.

KIE?: en ĉambro, sur tablo, sude, norde, oriente, okcidente, en inkujo, sur planko, sub lito, tie, ĉie.

KIOM?: multaj, malmultaj, tri, cent, mil.

ADVERBOJ?: Matene, sude, tage, nokte, rapide, malrapide, bone, malbone.



KVARA LECIONO

(Por rakonto aŭ pridiro, lego kaj legigo, kaj skribigo):

Nun estas posttagmezo de dimanĉo, dudek-tria tago de junio de la jaro mil-naŭcent-tridek-kvina. Mi ne laboras, mi ripozas kaj iras al teatro amuzi min. Hieraŭ estis sabato. Hieraŭ matene mi ellitiĝis frue kaj multe laboris. Mi lavis min kiel ĉiutage per akvo kaj sapo; mi matenmanĝis je la oka, tagmanĝis je la 12^a kaj duono kaj vespermanĝis je unu kvarono post la oka. Hieraŭ mi vidis mian amikon Petro. Mi salutis lin per la ordinara esprimo aŭ frazo: “kiel vi fartas?” aŭ “kiel vi statas?”

Tri libroj sur tablo estas malmultaj, sed 12 libroj sur tablo estas multaj. Do: sub figuro num. 5 estas multe da libroj, kaj sub figuro num. 4 estas malmulte da libroj. Novjorko havas multajn loĝantojn. Lokarno havas

malmultajn. Novjorko estas urbo pli granda ol Parizo. Londono ankaŭ havas multe da loĝantoj. Mi loĝas en Barcelono, ĉefurbo de Katalunujo. Berlino estas la ĉefurbo de Germanujo. Svedujo kaj Norvegujo estas landoj. Stokholmo kaj Oslo, Dresdeno kaj Leningrado estas urboj. Finnlando estas norde kaj Italujo estas sude, de Eŭropo. Afriko, Azio kaj Ameriko estas grandaj kontinentoj. Japanujo konsistas el kelkaj insuloj.

A, B, C, D, estas literoj. *Papero, libro, plumo, oceano* estas vortoj. La vorto *libro* havas kvin literojn. La vorto *papero* havas tri silabojn. Per kraĵono mi skribas vortojn. Hieraŭ mi legis tutan paĝon de granda libro. Nun mi parolas, mi diras al vi, kion mi faris hieraŭ. Hieraŭ kaj antaŭhieraŭ estas pasintaj tagoj. En la pasintaj tagoj kaj noktoj, mi manĝis, mi dormis, mi staris, kuŝis, sidis, skribis, parolis, amuziĝis, ridis kaj tiel plu. En la pasinta jaro 1937, venis, el Ameriko, onklo mia; sed li ne havas monon, li ne estas riĉa; li devas laboradi por gajni monon. Ĉiuj animaloj naskiĝas, kreskas kaj mortas. Kolombo naskiĝis antaŭ kvin jarcentoj.


EKZERCOJ

(Por respondado, interparolado, legigo kaj skribigo):

Ĉu Bilbao estas urbo aŭ insulo? — Ĉu Iberio estas kontinento aŭ duoninsulo? — Ĉu persono kvardekjara ankoraŭ kreskas? — Ĉu vi naskiĝis hieraŭ? — Ĉu viaj kvar geavoj jam mortis? — Ĉu ili ankoraŭ vivas? — Ĉu vi venis al la klaso dum la pasinta semajno? — Ĉu vi hodiaŭ ellitiĝis frue aŭ malfrue? — Ĉu vi lernis kalkulado en la infanlernejo? — Ĉu vi lernas geografin ĉi tie? — Ĉu vi enlitiĝas matene aŭ vespere? — Ĉu vi eniras antaŭ la leciono aŭ post ĝi? — Ĉu vi eliras post la leciono aŭ antaŭ ĝi? — Ĉu vi legis hieraŭ? — Kiu tago de semajno estas hodiaŭ? — Kiu tago de semajno estis antaŭhieraŭ? — Kion vi faris en la teatro la pasintan dimanĉon? — Kion vi faras nun? — Ĉu vi dormas nun? — Ĉu vi dormis la pasintan nokton? — Ĉu vi havas onklon en Ameriko? — Ĉu vi iam estis en Anglujo? — Ĉu la vorto **tablo** havas tri silabojn? — Kiom da literoj ĝi havas? — Ĉu estas multaj loĝantoj en Lokarno? — Ĉu Londono havas multe da loĝantoj? — Ĉu vi lernis la rusan lingvon? — Ĉu vi komprenas la francan? — Ĉu tiu, kiu havas multan monon, estas riĉa? — Ĉu tiu, kiu estas riĉa, estas feliĉa? — Kioma tago estas hodiaŭ? — Hodiaŭ estas la 23.^a de junio. — Kioma tago estis hieraŭ? — Hieraŭ estis la 22.^a de junio. — Kioma tago estos morgaŭ? — Morgaŭ estos la 24.^a. — Kiom da loĝantoj havas Barcelono? — Barcelono havas unu milionon da loĝantoj. — Kioma horo estas nun? — Kioma horo estis, kiam vi komencis tagmanĝi hieraŭ? — Je kioma horo vi finis tagmanĝi? — Ĉu Madrido havas tiom da loĝantoj kiom Parizo? — Ne, Parizo havas pli da loĝantoj ol Madrido. — Ĉu vi hieraŭ vidis vian amikon Petro? — Per kiu esprimo vi salutis lin? — Ĉu vi havas tiom da kraĵonoj, kiom da libroj? — Kiun daton ni havis hieraŭ? — Hieraŭ ni havis la 22.^{an} de Junio. — Ĉu Madrido estas urbo aŭ lando?

KIOM?—2, 3, 94, multaj, multe, iom, tiom kiom, malmulte, neniom.

KIAM?—Nun, poste, antaŭe, hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ, iam, neniam, ĉiam, tiam, kiam.



KVINA LECIONO

(Por rakonto aŭ pridiro, lego kaj legigo, kaj skribigo) :

Paŭlo (1) kaj Petro (2) estas infanoj (1, 2, 3, 4), kiuj iras al lernejo. Ilia kuzino Paŭlino (4) havas longajn harojn (20). La frato (3) de Paŭlino havas mallongajn harojn (5). Ĉuj infanoj vizitas lernejon por lerni legadon, skribadon kaj kalkuladon. Kian ili estas okjaraĝaj ili jam povas legi kaj skribi nomojn de korp parto; **kapo** (10), **haroj** (5), **ŝultroj** (11), **brakoj** (13), **manoj** (14), **fingroj** (15), **kruroj** (16), **piedoj** (17).

Vi havas multajn harojn, sed nur du orelojn (6). Unu orelo estas dekstra, kiel la dekstra mano, kaj la alia estas la maldekstra. Ankaŭ estas la


dekstra kaj la maldekstra piedoj. Vi skribas per la dekstra mano. Vi vidas per ambaŭ (la du) okuloj (7). Per la kruroj ni marŝas, ni piediras (iras per la piedoj). Kiam ni iras per aŭtomobilo, aviadilo, trajno aŭ alia veturilo, ni veturas. La kulero kaj la forko estas manĝiloj, ĉar ili taŭgas por manĝado. La kraĵono kaj la plumo taŭgas por skribado; do, ili estas skribiloj. Piano kaj violono estas muzikiloj, ĉar ili estas instrumentoj per kiuj oni muzikas. Ĉu vi muzikas? Ne, sed mia patro estas muzikisto, kaj ludas pianon. Knaboj ordinare ludas per pilko, kaj, knabinoj, per pupo: pilko kaj pupo estas ludiloj. Virtaj personoj manĝas por vivo; kelkaj personoj vivas por manĝado, ili deziras nur manĝi. Mi legas por instrui min. Mi skribas por saluti mian amikininon, kiu loĝas eksterlande. Korespondafranko por eksterlando estas pli kara ol por enlando.

Avoj, patroj, fratoj, estas viroj. Avinoj, patrinoj, fratinoj, estas virinoj. Virinoj ordinare ne havas harojn sur la vangoj (19). Viroj ordinare havas harojn sur la vangoj kaj mentono (9) kaj ĉirkaŭ la lipoj (8). La lipoj estas supre kaj malsupre de la buŝo, sub la nazo (12).

EKZERCOJ

(Por respondado, interparolado, legigo kaj skribigo):

Kien vi iras por lernado, infanoj? — Kie estas vi nun? — Kien vi iras ordinare post la leciono? — Ĉu ordinare knabinoj havas pli longajn harojn ol knaboj? — Ĉu viaj gekuzoj vizitas lernejon? — Por kio geknaboj iras al lernejo? — Per kio vi vidas, aŭdas, parolas? — Por kio vi aŭskultas? — Mi aŭskultas por bone aŭdi. — Kiom da oreloj vi havas? — Kiel estas nomataj la du oreloj, manoj, kruroj, kaj cetere, por diferencigi nome unu de la alia? — Ĉu vi nome diferencas de via frato? — Ĉu vi havas harojn sur la nazo? — Ĉu vi malfermas la buŝon por manĝo kaj trinko? — Ĉu oni manĝas aŭ trinkas akvon? — Ĉu vi fermas aŭ malfermas viajn okulojn por dormo? — Per kio oni ludas fortepianon? — Kiom da fingroj vi havas? — Ĉu vi havas amikininon loĝantan eksterlande? — Kiel estas nomataj la instrumentoj, kiuj taŭgas por manĝo? — Ĉu vi manĝas panon aŭ pano manĝas vin? — Dum vi trinkas, kiu estas trinkanta, kaj, kio, trinkata? — Post la trinko, la persono estas trinkinta kaj la akvo estas trinkita. — Ĉu vi nun estas deziranta manĝi? — Ĉu viroj ordinare havas harojn ĉirkaŭ la supra kaj la malsupra lipoj? — Por kio vi malfermas vian buŝon? — Kion vi malfermas por lego? — Per kio vi marŝas? — Ĉu vi skribas per via maldekstra mano? — Kiuj manĝiloj estas uzataj ĉe manĝado? — Ĉu vi estas nomata Paŭlo? — Kion oni faras per tiu manĝilo, kiu estas nomata forko? — Per kiu manĝilo oni tranĉas la viandon? — Per kiu manĝilo vi portas la pecojn de viando aŭ de legomo de via telero al via buŝo?



SESA LECIONO

(Por rakonto aŭ pridiro, lego kaj legigo, kaj skribigo):

Matene, Jakobo, post ellitiĝo, lavas (4) sin per akvo kaj sapo. Li kovras sian korpon per vestaĵoj: ĉapelo (1) aŭ ĉapo (2), kolumo (10), kravato (11). Mia frato tenas sian pantalonon (5) per zono kaj mi tenas la mian per ŝelko (6). Sub la veŝto (12) kaj en la pantalonon estas la ĉemizo. Jako (13), veŝto kaj pantalonon havas poŝojn (14). Sur la kruroj kaj piedoj estas portataj ŝtrumpoj (15) aŭ duonŝtrumpoj (7). Por la piedoj estas uzataj ankaŭ ŝuoj (8). Sur virina korpo ni ne vidas ordinare jakon kaj pantalonon sed korsaĵon (19) kaj jupon (20). Jupo estas pli longa ol korsaĵo. Kelkaj vestaĵoj estas subvestaĵoj, kiel ĉemizo, ŝtrumpoj, kalsono; sed aliaj estas


survestaĵoj, kiel mantelo aŭ palto (24) kaj antaŭtuko (21). Estas videbla diferenco inter vira ĉemizo kaj virina (17). Ankaŭ estas dormĉemizo (16) kaj tagĉemizo; sed oni uzas ankaŭ aliajn dormovestojn. Sur manoj ne estas uzataj ŝuoj, sed gantoj (23). Ĉirkaŭ la kolo (9) estas survestita la kolumo.

En Esperanto estas nur unu litero por ĉiu sono aŭ fonemo, kaj ĉiu litero esprimas nur unu fonemon aŭ sonon. Ne estas esceptoj al tiu logika regulo. Tial la ortografio de Esperanto estas fonetika kaj facila. Ĉiam, kiam oni aŭdas saman fonemon oni skribas saman alfabetan signon, sed oni devas korekte elparoli. Ĉiam, kiam oni vidas saman literon oni devas elparoli la saman fonemon. Tial estas necesa, korekta skribo. Diference devas esti elparolataj la konsonantaj sonoj de **bo** kaj **vo**, **bo** kaj **po**, **co** kaj **so**, **so** kaj **zo**, **do** kaj **to**, **go** kaj **ko**, **lo** kaj **ro**, **ĵo** kaj **ĝo**, **ŝo** kaj **ĉo**. La unua silabo de **espero** estas **es**, dum la unua silabo de **speco** estas **spe**. Hispanlingvanoj atentu la diferencan inter **bo** kaj **vo**, **ŝo** kaj **ĉo**, **ĵo** kaj **ĝo**, **espe** kaj **spe**; germanlingvanoj, la diferencan inter **bo** kaj **po**, **go** kaj **ko**, **do** kaj **to**, **so** kaj **zo**; ekstremorientanoj, la diferencan inter **lo** kaj **ro**. Ĉiu naciانو devas speciale ekzercadi la malfacilajn diferencojn.

EKZERCOJ

(Por respondado, interparolado, legigo kaj skribigo):

Kie estas survestita la kolumo? — Ĉu vi laboras dumnokte? — Ĉu vi vestas aŭ senvestigas vin por enlitiĝo? — Ĉu vi surmetas aŭ formetas viajn ŝuojn por iri al via laboro? — Kiuj vestaĵoj estas portataj ĉirkaŭ la kolo, sur la piedoj? — Ĉu ordinare ŝtrumpoj estas pli longaj aŭ pli mallongaj ol gantoj? — Ĉu palto estas subvestaĵo aŭ survestaĵo? — Ĉu antaŭtuko estas portata en poŝo? — Ĉu poŝtuko ordinare taŭgas por purigi piedojn aŭ nazon? — Ĉu neĝo sur arboj estas ĝenerale pura aŭ malpura? — Ĉu infanoj rapide malpurigas sin? — Ĉu porkoj estas malpuraj? — (Kiam vi sufiĉe dormis, vi vekigis) Kiam vi vekigis? — Ĉu vekhorloĝo aŭ helpanto estas necesa por veki vin? — Ĉu vi facile aŭ malfacile vekigis? — Ĉu vi rapide aŭ malrapide vestas vin? — Ĉu via fratino rapide aŭ malrapide vestas sin? — Ĉu la elparola diferenco inter **eskri** kaj **skri** estas por vi facila aŭ malfacila? — Ĉu vi facile aŭ malfacile diferencigas inter **ŝo** kaj **ĉo**? — Ĉu inter **lo** kaj **ro** estas malfacila diferenco por japanoj? — Ĉu la Esperanta fonetiko estas regula aŭ malregula? — Ĉu la esperanta ortografio estas logika aŭ mallogika? — (Ĝi estas tre logika, ĉar ĝi plene akordiĝas kun la fonetiko). — Ĉu kelkaj aŭ pluraj sonoj estas reprezentataj per unu litero en Esperanto? — Ĉu vi tenas vian pantalonon per **sono** aŭ per **zono**? — Kiom da silaboj estas en la vorto piedo? — Ĉu vi diferencigas je **persono** kaj per **sono** de **per** **zono**? — Ĉu **personoj** parolas per **sonoj** aŭ per **zonoj**? — Ĉu la konsonanto de **ŝo** havas simplan aŭ malsimplan sonon? — Ĉu la konsonanto de **ĉo** havas simplan aŭ malsimplan sonon? — Ĉu la sono konsonanta de **to** kaj la sono konsonanta de **jo** estas ambaŭ en **ĝo**? — Ĉu oni ĝenerale vestiĝas antaŭ enlitiĝo? — Kiam oni ĝenerale senvestiĝas?



SEPA LECIONO

(Por rakonto aŭ pridiro, lego kaj legigo, kaj skribigo) :

La unua tago de la monato januaro estas la komenco de jaro, kiu daŭras ĝis la tridek-unua tago de decembro, fino de la jaro aŭ jarfino. Ni komencas la lecionon je la oka horo, kaj finas ĝin je la naŭa: nia leciono daŭras unu horon aŭ sesdek minutojn.

Dum la monatoj decembro, januaro kaj februaro estas neĝo (6), la vetero estas malvarma; tiu tempo estas nomata vintro; post vintro estas printempo; somero kaj aŭtuno estas la du ceteraj sezonoj. Dum la somera tempo, la vetero estas varma; tiam ni iras al marbordo (4) por nin bani kaj por naĝi. Kiam pluvas (7), ni uzas pluvombreton (8). Kiam la atmosfero

estas klara, tiam la ĉielo estas blua, ĉar ne estas nuboj, kiuj kovras ĝin, sed suno, kaj la vetero estas bona. Se la suno estas tre varma, en somero, ni uzas ombrelon, aŭ grandan pajlan ĉapon aŭ ĉapelon. Kiam la lernejo ne funkcias pro somera aŭ kristnaska libertempo, ni veturas per aŭtomobilo (9) al aliaj urboj, urbetoj aŭ landoj.

Kiam estas vintro en la norda hemisfero, tiam estas somero en la suda hemisfero.

Nun mi lernas lecionon, aŭ nun mi estas lernanta lecionon. Mi ankoraŭ ne finis lerni ĝin. La leciono estas nun lernata de mi. Ĝi ankoraŭ ne estas tute lernita de mi; mi ankoraŭ ne scias bone ĉion, kio estas en la leciono. Estas kelkaj vortoj, kiujn mi ne bone memoras. La sesa leciono estas jam tute lernita de mi; mi scias ĝin bone. Mi ankoraŭ ne komencis lerni la okan lecionon. Mi estas ĝin lernonta: mi lernos ĝin en la proksima semajno.

Dum la jarfina libertempo en Eŭropo ni sportas laŭ vintraj sportoj, precipe skiante sur neĝo. Ni ankaŭ multe ludas piedpilkon kaj kuradon aŭ ekskursadon. Dum la jarmeza libertempo ni ripozas loĝante kelkajn semajnojn sur kamparo aŭ marbordo, kie ni spiras liberan kaj puran aeron. Mi ankaŭ ŝatas promeni en arbaroj sur montoj, kaj halti por aŭskultadi mildan muzikon de birdoj kaj venteto tra la arbaro.


Kiam vi libertempas? Mi libertempas dufoje ĉiujare: jarfine kaj jarmeze. Kiam via libertempo estas pli longa: vintre aŭ somere? Mia somera libertempo estas preskaŭ dumonata; sed, vintre, mi libertempas nur du semajnojn.

EKZERCOJ

(Por respondado, interparolado, legigo kaj skribigo):

En kiu tago komenciĝas jaro? — Kiam finiĝas jaro? — Kioma monato estas julio? — (Julio estas la sepa monato). — Kioma horo estas nun? — Je kioma horo komenciĝas nia leciono? — Je kioma horo ĝi finiĝas? — Ĉu vi komencas vian laboron matene? — Kiom longe daŭras via profesia laboro tage? — Ĉu unu horo daŭras cent minutojn? — Kian veteron ordinare ni havas dum la vintra tempo? — Ĉu dum printempo ni havas pli bonan veteron? — Ĉu vi iras pasigi libertempon for el la urbo, kiam la vetero estas tre varma? — Ĉu plaĉas al vi marbanoj kaj sunbanoj? — Kiom da sezonoj estas en jaro? — En kiu sezono la vetero estas pli pluva? — Kiam estas pli varme, dum tago aŭ dum nokto? — Ĉu pluvombrelo estas utila, kiam pluvas?

Ĉu sude la ĉielo estas blua pli ofte ol norde? — Ĉu la ĉielo estas griza, kiam falas blanka neĝo? — Ĉu oni uzas pajlan ĉapelon en vintro, kiam malvarmas, pluvas, neĝas? — Ĉu funkcias ĉiuj lernejoj dum la tuta varma sezono? — Ĉu via lernejo funkcias dimanĉe? — Ĉu hieraŭ, marde, vi laboris? — Ĉu vi laboras ĉiutage? — Ĉu vi laboros morgaŭ, ĵaŭde? — Ĉu vi iros promeni la proksiman dimanĉon? — Ĉu vi veturos eksterlanden, la proksiman someron? — Ĉu vi iam loĝis eksterlande? — Ĉu la hodiaŭa mateno jam forpasis? — Ĉu ĝi estas ankoraŭ pasonta? — Ĉu baldaŭ estos nokto? — Ĉu vi memoras ĉion, kion vi lernis? — Ĉu vi lernis kaj forgesis algebron? — Ĉu vi estas lernonta ĉinan lingvon? — Ĉu vi lernas, lernis aŭ lernos muzikon? — Ĉu vi scias, kio okazis hieraŭ? — Ĉu vi scias, kio okazos morgaŭ?



OKA LECIONO

(Por rakonto aŭ pridiro, lego kaj legigo, kaj skribigo):

Mia patro estas la edzo de mia patrino. Ili estas geedzoj. La edzino de mia patro estas mia patrino. Mi estas ŝia filo (de ŝi (patrino) kaj lia filo (de li (patro)). Do mi estas ilia filo (de ili (gepatroj)).

Hodiaŭ mia patrino havis viziton de amikino sia. Mi aŭdis ilian interparolon:

—Bonan tagon, Maria. Kiel vi fartas?

—Bone, dankon; kaj vi, kaj via familio?

—Mia infano Everest hieraŭ enlitiĝis pro kopedoloro, kaj hodiaŭ li estas

ankoraŭ iom febra. Espereble li baldaŭ tute resaniĝos. Ernest kaj Kalinka fartas ĉiam bone. Miaj fratinoj Volga kaj Francina ankaŭ ŝajnas esti fortikiĝintaj, de kiam ili komencis labori.

—Kompreneble. Oni bezonas okupon.

—Jes, sed vi scias ke fraŭlinoj malvolonte rezignas ne plu pensi, ke ili devas edziniĝi je princo, kaj vanti aŭ fanfaroni pri socia rango, pri modaj vestaĵoj, pri multekostaj tualetaĵoj. Fine ili konvinkiĝis ke ilia aĝo devigis ilin fari ion pozitivan, kaj ili aĉetis komercejon de parfumaĵoj kaj aliaj luksaĵoj. Kaj nun ili eĉ pledas ke virinoj devas labori, gajni monon kaj utili al la homaro per okupoj praktikaj.

—Vere ĉio evoluas, eĉ niaj sentoj kaj opinioj. Kaj fine ni povas esti kontentaj nur pri tio, kion ni faris por bono kaj utilo, ne nur intence sed fakte.

EKZERCOJ

(Por respondado, interparolado, legigo kaj skribigo) :


Kio estas via patro al via patrino? Li estas ŝia edzo. — Kio estas via patrino al via patro? Ŝi estas lia edzino. — Ĉu ili estas viaj gefratoj? — Ĉu vi havas amikojn? — Ĉu vian patrinon vizitis amikino? — Ĉu vi aŭdis ilian interparoladon? — Kiun salutesprimon diris al Mario, ŝia amikino? — Kion respondis Mario? — Kial la infano Everest devis enlitiĝi hieraŭ? — Ĉu vi havas kapdoloron, nun? — Ĉu Everest estas hodiaŭ ankoraŭ febra? — Ĉu espereble li baldaŭ resaniĝos? — Kiel fartas Ernest kaj Kalinka? — Kiel vi fartas? — De kiam Volga kaj Francina ŝajnas esti fortikiĝintaj? — Ĉu vi laboras multe? — Ĉu oni bezonas okupon? — Ĉu oni bezonas manĝadon por vivado? — Ĉu junaj fraŭlinoj emas pensi kaj deziri princon por edzo? — Ĉu vi arogantas aŭ fanfaronas pri via socia rango? — Ĉu virinoj ŝatas modajn vestaĵojn kaj tualetaĵojn? — Ĉu ĝenerale oni fine konvinkiĝas ke oni devas fari ion pozitivan? — Ĉu vi havas komercejon? — Ĉu vi uzas parfumaĵojn kaj luksaĵojn? — Ĉu vi pledas ke virinoj devas laboradi por gajni monon? — Ĉu intencoj sufiĉas? — Ĉu faktoj estas necesaj por konvinkado? — Ĉu vi opinias, ke ĉio evoluas? — Ĉu vi estas esperantisto fakte aŭ nur intence? — Ĉu vi lernas Esperanton volonte aŭ nevolonte? — Ĉu multaj personoj laboras nevolonte? — Ĉu fraŭlinoj volonte survestas luksaĵojn? — Ĉu virinoj pretendas ke nur viroj devas perlabori monon?

Sro. Profesoro:

Ĉiuj vortaroj kaj gramatikoj de vivanta lingvo estas verkitaj kaj studataj post praktika lernado de la lingvo kaj en ĝi, kaj tute ne antaŭe! Esperanto estas hodiaŭ vivanta lingvo. Oni devas lerni kaj lernigi ĝin, unue, praktike, kiel la gepatroj lernigas la infanojn paroli, kiel la infanoj lernas paroli hejme.

Post la baza kaj vivanta parolata lingvo, venu la gramatiko kaj la vortaro, kaj la gramatikisto kaj la vortaristo; sed unue la vivo kaj poste la filozofio.

Bonvolu legi la instrukciojn sur la paĝo 26.



NAUA LECIONO

(Por rakonto aŭ pridiro, lego kaj legigo, kaj skribigo):

La linio a-b estas longa. La linio i-u estas mallonga. Skribita punkto (1) estas ronda. La tablo (2) estas rektangula. La bildo aŭ pentraĵo (3) estas kvadrata. La fenestro (4) estas malfermita kaj la pordo (5) estas fermita. Mi havas blankan horloĝon, poŝhorloĝon, kiu estas arĝenta. Nikelaj horloĝoj estas ankaŭ, ordinare, blankaj. Murhorloĝoj kaj turhorloĝoj estas grandaj, kaj poŝhorloĝoj estas malgrandaj. Malgranda horloĝo estas horloĝeto. Granda, estas horloĝego.

Mia onklo havas ne blankan, sed flavan poŝhorloĝon; ĝi estas nek arĝenta nek nikela, sed ora. Aliaj metaloj ol oro, arĝento kaj nikelo, estas fero, aluminio, kupro, ŝtalo, plumbo, zinko.

Kravatoj, ĉapeloj, kaj aliaj vestaĵoj, ne estas el metalo, sed el ŝtofo silka, batista, kotona, velura, lana, tola, k. a. La somerĉapelo de mia fratino estas el pajlo. Mia kravato estas el silko kaj mia pantalono estas el lano.

El kio estas la inkujo? Ĝi estas el vitro. Ĉu viaj ŝuoj estas el ŝtono? Ne, sinjoro; ili estas el ledo. La tablo estas el ligno. El kio estas la ŝego? Ĝi estas ankaŭ el ligno.


Ĉu estas kraĵonoj (6) sur la tablo? Jes, sur ĝi estas kelkaj kraĵonoj. Kiom da kraĵonoj? Kiom da linioj estas sur la bildo? El kio estas, ordinarre, pordo? Ĉu en fenestro estas ofte vitroj? Ĉu estas io sur la seĝo? Ne, sinjoro, sur ĝi estas nenio. Kiom da kraĵonoj estas en viaj poŝoj? Mi havas neniun kraĵonon en ili.

Hodiaŭ mi ne iros al lernejo, ĉar estas dimanĉo. Mi iros morgaŭ, lunde. La instruisto, hieraŭ matene, diris al mi: stariĝu!, iru al la nigra tabulo, prenu kreton, skribu vian nomon, lasu la kreton, prenu la viŝilon, malaperigu vian nomon de la nigra tabulo, kaj reiru al via sidloko. Mi bonvole plenumis liajn ordonojn: mi stariĝis, iris al la nigratabulo, prenis kreton, skribis mian nomon, lasis la kreton, prenis viŝilon, malaperigis mian nomon de la nigra tabulo, kaj reiris al mia sidloko.

EKZERCOJ

(Por respondado, interparolado, legigo kaj skribigo):

Kiu linio estas longa? — Kia estas la linio i-u? — Kiom da kraĵonoj estas sur la tablo? — Kia estas skribita punkto? — Ĉu pentraĵo estas, ordinarre, kvadrata? — Kia estas la tablo (2)? — Kio estas malfermita, la pordo aŭ la fenestro? — Ĉu via libro estas ronda aŭ rektangula? — Kiu horloĝoj estas grandaj? — Kiu estas malgrandaj? — Kio estas farita el ligno? — Ĉu via poŝhorloĝo estas ligna aŭ metala? — Kiel estas nomataj la ĉefaj metaloj? — El kio estas farita, kravato? — Ĉu via ĉemizo estas tola? — Ĉu vi havas velurajn vestaĵojn? — Ĉu via vintroĉapelo estas farita el felto? — Ĉu sinjorinoj nuntempe multe surmetas peltaĵojn? — Ĉu via kravato estas pajla? — Per kio vi skribas sur nigra tabulo? — Per kio vi forigas skribaĵon de nigra tabulo? — Ĉu la vorto ne estas simpla aŭ kunmetita? — Ĉu la vorto **jes** estas kunmetita? — Ĉu la vorto **poŝhorloĝo** estas simpla? — Ĉu **kapdoloro** estas kunmetita? — Ĉu en via nacia lingvo ankaŭ estas kunmetitaj vortoj? — Kiu metalo estas flava? — Kiu metalo estas griza? — Kiu metalo estas blanka? — Ĉu plumbo estas pli peza ol aluminio? — Ĉu vitraĵo estas pli peza ol pajlajo? — Kio estas pli peza: plumajo, paperaĵo aŭ metalajo? — Ĉu via ĉapelo estas papera, ŝtofa aŭ metala? — Ĉu via kravato estas lana, silka aŭ kotona? — Kion ordonis al vi, via instruisto? — Ĉu vi plenumis liajn ordonojn?



DEKA LECIONO

(Por rakonto aŭ preparolo, lego kaj legigo, kaj skribigo):

- Per kio vi skribis sur nigra tabulo?
- Mi hieraŭ, en la lernejo, skribis, sur nigra tabulo, per blanka kreto.
- Ĉu ekzistas aliaj skribiloj?
- Jes, sinjoro: kraĵono, plumo kaj ĉiuj instrumentoj, per kiuj oni povas skribi, estas skribiloj. Tiel ankaŭ la oreloj estas aŭdiloj, ĉar ili estas la aŭdorganoj aŭ instrumentoj, per kiuj oni aŭdas; kiel la okuloj estas vidiloj.
- Ĉu ĉiuj aŭdiloj estas oreloj kaj ĉiuj vidiloj estas okuloj?

—Ne, sinjoro: estas ankaŭ artefaritaj instrumentoj, kiuj taŭgas aŭ helpas por aŭdado kaj vidado, kiel la telefonaj aŭdiloj kaj la okulvitroj; kaj, do, ankaŭ ekzistas artefaritaj aŭdiloj kaj vidiloj.

Ni ŝatas la kamparon, ĉar tie ni vidas multajn kaj diversajn bestojn kaj vegetaĵojn. Inter ili mi memoras la bovinon (2), de kiu ni eltiras bonan blankan lakton. Estas ankaŭ bovidoj (3) kaj ŝafoj (4), kies karnon ni utiligas por prepari viandon por nia nutrado. La kokinoj (7) donas al ni ovojn (8) kaj el la ovoj post kovado elestas kokidoj (6). Ni plezure manĝas viandon de porko (5). Ne ĉiaj manĝaĵoj estas bonaj nutraĵoj.

Ni manĝas ne nur viandon, sed ankaŭ legomojn (10) kaj fruktojn. Tre bongustaj estas la piroj (18), la ruĝaj ĉerizoj (19), la veluraj persikoj (20), la molaj kaj dolĉaj prunoj (21), la brilaj pomoj (17), k. a. (kaj aliaj) fruktoj.

Inter la plej konataj legomoj estas terpomoj (15), brasikoj (11), florbrasikoj (12), verdaj fazeoloj (13), pizoj (16) kaj spinacoj.

Tre bela estas florigardeno. Sed pli necesa estas legomĝardeno (9).

Per la nazo ni flaras. Bonaj odoroj plaĉas al ni. Multaj floroj estas tre bonaj flaraĵoj kaj belaj vidaĵoj.

EKZERCOJ

(Por respondado, interparolado, legigo kaj skribigo):

Kio estas skribiloj? — Kiuj estas la plej uzataj skribiloj? — Ĉu vi skribas sur nigra tabulo per plumo kaj inko? — Ĉu vi skribas sur papero per kreto? — Ĉu ekzistas naturaj kaj artefaritaj aŭdiloj kaj vidiloj? — Kiel estas nomataj la naturaj aŭdiloj? — Ĉu ekzistas artefaritaj langoj por parolado kaj manĝado? — Ĉu vi vidas per la piedoj? — Per kio vi pensas? — Kie estas la cerbo? — Ĉu nia sango estas blua, blanka aŭ ruĝa? — Kiu estas nia organo por la movado de la sango? — Ĉu la koro estas natura aŭ artefarita motoro? — Ĉu artefaritaj vidiloj estas utilaj sen naturaj okuloj? — Ĉu vi estas blinda? — Ne, ĉar mi povas vidi. — Ĉu vi estas surdulo? — Ne, ĉar mi povas aŭdi, kaj surdulo estas persono, kies oreloj estas senaŭdaj. — Kiel estas nomata persono, kies ambaŭ okuloj estas senvidaj? — Ĉu muta persono estas mutulo? — Ĉu via edzino estas muta? — Ĉu vi ŝatas la kamparon? — Kial? — Ĉu vegetaĵoj estas kreskaĵoj? — Ĉu via horloĝo kreskas? — Ĉu ordinara horloĝo estas metalaĵo? — El kio devenas kokidoj? — Kies karno estas pli bona viando, tiu de bovino aŭ tiu de bovido? — Kion vi pli ŝatas vidi: florojn aŭ legomojn? — Kion vi preferas manĝi? — Kiujn legomojn kaj bestojn vi povas nomi en Esperanto? — Ĉu koko estas pli granda kaj bela ol kokino? — Kio estas pli blanka: akvo, lakto aŭ neĝo? — Ĉu fruktoj estas ĝenerale bongustaj manĝaĵoj? — Ĉu ĉiaj nutraĵoj estas manĝaĵoj? — Ĉu belaj vidaĵoj, kiel ekzemple floroj, estas nutraĵoj? — Ĉu bonaj legaĵoj estas spiritaĵoj? — Ĉu ankaŭ bonaj aŭdajoj povas esti spiritaĵoj? — Ĉu floroj estas, ĝenerale, bonaj flaraĵoj kaj belaj elvidaĵoj?



DEK-UNUA LECIONO

(Por rakonto aŭ prediro, lego kaj legigo, kaj skribigo) :

—Hodiaŭ estas dimanĉo. Vi ne iras al la lernejo. Vi havas libertempon. Vi restas hejme ludi, aŭ iras promeni. Kion vi faros morgaŭ, lunde?

—Morgaŭ, lunde, ni ellitiĝos frumatene, je la sesa kaj duono aŭ la sepa. Mi lavos min per akvo kaj sapo; per kombilo (1) mi kombos mian hararon, mi matenmanĝos (2) kaj mi iros al la lernejo.

—Kion vi faros en la klasoj?

—Mi legos, skribos, lernos historion, geografion, aritmetikon, desegnon (3) kaj muzikon, kaj mi faros gimnastikon.

—Ĉu vi komprenas la vorton **hararo**?

—Jes, sinjoro. Mi scias ke **hararo** estas kunmetita vorto el la radiko **har'**, la sufikso **-ar'** kaj la substantiva finiĝo **-o**. Kaj same kiel **homaro** signifas ĉiujn homojn, **hararo** signifas ĉiujn harojn, kiujn mi kombas kaj havas sur la kapo, sur la vizaĝo, k. c. **Kataluna Esperantista Federacio** havas jenan devizon: “maro estas gutaro”, kiu aludas la forton de unueco necesa por venki. Iu diris: disigu, kaj vi venkos.

La sufikso **-er'** esprimas proksimume la kontraŭon de **-ar'**. **Homo** estas **ero** de **homaro** aŭ **homarero**. La leĝa rimedo por pagi estas mono, ĉu papera mono kiel bankbileto, ĉu metala mono; kvin-centima peco estas **monero**; antaŭ kelkaj jaroj, kvin-centimaj kaj dek-centimaj moneroj estis kupraj. Antaŭ la milito estis multaj oraj moneroj en kelkaj landoj. Nun estas nur arĝentaj. En multaj landoj estas nuntempe nikelaj moneroj por malmultaj centimoj, aŭ malgranda valoro. Sur marbordo estas sablo. En sablo estas senfinaj sableroj. Se estas fajro en vento, fajreroj flugas ĉirkaŭe.

Haroj estas harareroj, vortoj estas vortareroj, sableraro estas sablo!

EKZERCOJ

(Por respondado, interparolado, legigo kaj skribigo):

Ĉu vi povas al mi diri la nomojn de la tagoj de la semajno? — Kiom da monatoj estas en jaro? — Kiel ili estas nomataj? — Je kioma horo vi ellitiĝas? — Kion vi faras matene? — Kion vi faros morgaŭ vespere? — Kie vi estis hieraŭ posttagmeze? — Kion oni ordinare lernas en ĝenerala lernejo? — Kion vi pli ŝate lernadis, kiam vi estis infano? — Ĉu la ĉina homaro estas la tuta homaro? — Ĉu la angla mono estas la tuta mono? — Ĉu vi memoras la devizon de Kataluna Esperantista Federacio? — Ĉu estas unueco en ĉiuj sociaj kaj politikaj movadoj? — Ĉu en via lando estas nur metala mono?

Kiu vorto estas pli klara: **gutarero** aŭ **guto**? — Ĉu vi komprenas, ke en Esperanto devas esti ĉio necesa, kaj ĉio sufiĉa? — Ĉu la vorto **homarero** estas necesa? — Ĉu **homo** sufiĉas? — Ĉu pano, kiun vi **manĝas** estas **manĝata**, **manĝita** aŭ **manĝota**? — Ĉu akvo, kiun vi **trinkis**, estas **trinkita**, **trinkata** aŭ **trinkota**? — Kiu letero estas **skribota**: tiu, kiun oni **skribis**, tiu, kiun oni **skribas** aŭ tiu, kiun oni **skribos**? — Ĉu hodiaŭ vi estas jam **dorminta**, nun **dormanta** aŭ ankoraŭ **dormonta**? — Ĉu vi estis dormanta, kiam mi klarigis al vi la pasintan lecionon?

DEK-DUA LECIONO

(Por rakonto aŭ prediro, lego kaj legigo, kaj skribigo):

Esperanto estas tre riĉa lingvo. Ĝi taŭgas ne nur kiel internacia komerca kodo, sed kiel internacia vere fleksebla lingvo por konigado de ĉiunaciaj literaturaĵoj kaj sciencaj verkoj.

Tre vasta kaj firma estas ankaŭ la movado por subteni la propagandon, konservadon kaj riĉigadon de la lingvo. La Esperantista movado konsistas el propagandaj naciaj societoj, internacia centra asocio, kaj lingvaj institucioj.

Nun estas eminentaj homoj esperantistaj, en ĉiuj civilizitaj landoj.

Dro. Zamenhof, kiu estis genia spirito, estas konsiderata nediskutebla majstro, kiu eĉ antaŭdiris pri la evoluo de la internacia lingvo, kiu fakte okazas ĝis tia grado, ke jam nun estas bele konstateblaj klasika kaj moderna lingvaĵoj, tute analogie al tio, kio okazas ĉe naciaj lingvoj.

Krom la lingvo mem, estas en Esperanto **interna ideo**: celo al justeco lingva kaj al paco internacia. Tiu interna ideo aŭ morala celo estas klare esprimita en la jena strofo de **La Espero**, Esperantista himno:

Sur neŭtrala lingva fundamento — Komprenante unu la alian,

La popoloj faros en konsento — Unu grandan rondon familian.

Nun vi, kara nova esperantisto, devas daŭrigi vian lernadon de Esperanto kaj utiligi ĝin por noblaj celoj, kvankam ĝi ankaŭ povas utili por malnoblaj, kiel la naciaj lingvoj, kiel ĉiuj rimedoj. Tial vi devas esti nobla, kaj ne malbonuzi Esperanton, kies kreinto donis al ĝi la vivon nur por bono de Homaro.

EKZERCOJ

(Por respondado, interparolado, legigo kaj skribigo):

Kia estas Esperanto? — Por kio ĝi taŭgas? — El kiuj organizaĵoj konsistas la Esperanto-movado? — Kion celas tiu movado? — Ĉu ekzistas lingvaj institucioj por konservado de naciaj lingvoj? — Ĉu estas esperantistoj en ĉiuj landoj? — Kiu estas la aŭtoro de Esperanto? — Kiel li estas konsiderata de la esperantistoj? — Ĉu Esperanto evoluas? — Ĉu naciaj lingvoj evoluas? — Kiel evoluas Esperanto? — Ĉu Doktoro Zamenhof antaŭvidis, ke Esperanto evoluos? — Ĉu Esperanto estas nur lingvaĵo? — Kio estas konstatebla ĉe la lingvo de Zamenhof? — Kion celas la **interna ideo** de Esperanto? — Ĉu la morala celo de Esperanto estas ie esprimita? — Ĉu vi estas esperantisto? — Kio estas esperantistoj, unuj al la aliaj? — Kio estas "La Espero"? — Ĉu vi konas strofon de la himno esperantista? — Ĉu vi jam sufiĉe bone scias Esperanton? — Ĉu lingvo povas utili nur por noblaj celoj? — Kial ĉiuj esperantistoj estas samideanoj? — Ĉu via patro devigas vin al lernado de Esperanto? — Ĉu vi iam interparolis en Esperanto kun eksterlandanoj? — Ĉu vi estas enlandano aŭ eksterlandano? — Ĉu vi estas samlandano de Sro. John Bull? — Ĉu vi kaj mi estas samurbanoj? — Ĉu madridanoj, parizanoj kaj berlinanoj estas samurbanoj? — Ĉu tokianoj estas katalunoj? — Ĉu barcelonanoj estas japanoj?

ESPERANTO

aŭ
lernanto
domo
tago
lasta
jaro
malmulte, malmultaj
multe, multaj
lerni
legi
scii
iri
kun, per
havi
ankaŭ
knabo
strato
tiam
varme, varma
pluvi
virino, edzino
feliĉa
bonvolu
vidi
poŝhorloĝo
silko
vitro
kio
ŝati, ami
malgranda
lakto
libertempo
akvo
matenmanĝo
kion mi faris
aŭdi
laŭte
forgesi
ofte
kie, kien

FRANÇAIS

ou
élève
maison
jour
dernier
an, année
peu
beaucoup
apprendre (apprennent)
lire
savoir (savent)
aller (vont)
avec
avoir (ont)
aussi
garçon
rue
alors
chaud
pleuvoir (pleut)
femme
heureux, heureuse
s'il vous plaît
voir
une montre
soie
verre
quoi
aimer
petit
lait
congé
eau
déjeuner
ce que j'ai fait
entendre
à haute voix
oublier
souvent
où

ENGLISH

or
pupil
house
day
last
year
little, few
much, many
to learn
to read
to know
to go
with
to have
also, too
boy
street
then
warm
to rain
woman, wife
happy
please
to see
a watch
silk
glass
what
to like, to love
little
milk
holidays
water
breakfast
what I did
to hear
loudly
to forget
often
where

INSTRUKCIO POR LA PROFESORO

La profesoro lernigos voĉe la vortojn kaj frazojn de la unua leciono montrante la signifon pere de la bildo. Ekz., la profesoro diros “Numero unu: *ruĝa libro*”, “Numero du: *ruĝa plumingo*”, kaj ripetigos al pluraj lernantoj, post demando “Numero unu?, *ruĝa libro*”, post demando “Numero du”, *ruĝa plumingo*”, k. t. p. La ekzerco post la teksto, helpos la profesoron, por paroligo.

La profesoro legos ĉiun frazon kaj ĝin ripetigos legige al pluraj lernantoj kaj korektos la elparolon, ĉefe kiam ĝi estos iom malfacila pro la fonetikaj apartaĵoj de la gepatra lingvo.

Post legigo, la profesoro reinterparolos kun la lernantoj, laŭ la enhavo de la leciono.

La profesoro simile procedos por la ceteraj lecionoj.

Post lernigo de signifo kaj elparolo de la unuaj tri lecionoj, la profesoro ekskribigos la tekston kaj ekzercon de la unua leciono, kaj, alterne kun la buŝa lernigado, la skribadon de la ceteraj lecionoj.

Kompreneble, ĉiu lernanto diferencas de la aliaj, ankaŭ ĉiu profesoro kaj ĉiu klaso aŭ lernantaro. Do ĉi tiuj instrukcioj havas nur ĝeneralan gvidcelon.

Delfi Dalmau, L. K.

aŭtoro de la lernolibro “Didakta”

PREZO KUN AFRANKO

de ĉi tiu lernolibro *Didakta*:

1 ekzemplero, 1 angla ŝilingo
30 ekzempleroj, 1 £.

Enlande:

1 ekzemplero, 2'75 ptoj.
20 ekzempleroj, 45 ptoj.
50 ekzempleroj, 90 ptoj.

Mendoj estas plenumataj nur se ilin firmigis mensendo al Apart. 5081, Barcelona, ĉe Delfi Dalmau.

OPINIARO

pri la unua eldono de la Lernolibro *Didakta*:

EL HUNGARLANDO:

“Jam mi studis multajn Esperantajn lernolibrojn, sed la *Didakta* estas unu el la plej praktikaj: ĝi donas al la instruanto tian fundamenton, ke sur ĝi li povas konstrui la tutan kursgvidadon. Nenio estas superflua, la gramatikajn regulojn ilustras ekzemploj, ekzemploj ekzistas por ĉiuj kazoj, el tiuj ekzemploj oni povas facile dedukti la regulojn. La vico de la lecionoj estas ankaŭ rezulto de serioza pensado, la tuta lernolibro respegulas la grandan instruon praktikon de la verkinto”.

Elemér Kirshbauer.
(Rakoshegy)

“La ekzercaro pravas, kia bona estas la libro *Didakta*”.

Béla Torok
(Békés)

EL BRAZILLO:

Mi vere entuziasmiĝis pri la majstra verko *Didakta*. Nur granda spertado pri lernigado povas enhavigi tiom multe da instruado en tiom malmulte da papero!

Ismael Gomes Braga
(Rio de Janeiro)

EL ĈINUJO:

“Mi tralegis la Lernolibron *Didakta* kaj ĝoje diras ke tiu verko estas tre sukcesa”.

R. Z. Chang
(Tientsin)

EL USONO:

“Ĉi tiu nova 21-paĝa broŝuro estas bildoriĉa lernolibro por buŝa instruado. La instruanto povas paroligi la lernantojn de la komenco. La vortoj kaj la temoj de la ekzercaro estas tre lerte elektitaj por tuja uzeblo. Oni lernas senkonscie la gramatikajn regulojn de Esperanto”.

Charles H. Briggs
(Minneapolis Minnesota)

EL GREKLANDO:

“Scienca verko de natura metodo de lingva instruado.—Ĝia enhavo preterlasas neniun punkton sciindan, ebligante akiri per dek du lecionoj ŝat-

indan scion Esperantan. — La simplaj tekstoj kaj demandoj, la belaj kaj taŭge elektitaj bildoj, bone respondas al la celo; certe spertado longa en instruado liveris ne nur modelan instruilon, sed ankaŭ plaĉan, per kiu lernantoj akiros gaje la elementojn de nia lingvo. La lernolibro *Didakta* pravas altan nivelon kaj portas al nia memoro la “multum in parvo”.

St. Patsuris-Mihaliardos, jr.
(Ateno)

“Ĝojege mi tralegis kaj trovis ke la Lernolibro *Didakta* estas la plej facila, komprenebla kaj praktika por ĉiuj komencantaj lernantoj de Esperanto”.

Moise A. Strumza
(Kavalla)

EL KANADO:

“Mi tre ŝatas la stilon kaj la enhavon de la Lernolibro *Didakta*, kaj post zorga tralegado, kredas ke ĝi prezentas tre utilan, facile-kompreneblan tekston.

La bildetoj estas tre klaraj, la sekvo de la vortoj, ideoj kaj esprimoj estas tre logikaj, laŭ mia opinio kiel instruisto de nia kara lingvo dum multaj jaroj. Kaj mirinde, mi ne eĉ trovis pres-eraron!”

P. L. Pratley
(Westmount)

EL HINDUJO:

“Mia sperto kun miaj Esperantigitaj nepetoj 8 - kaj 10 jaraj donas tujan supervidon, ke la Lernolibro *Didakta* estas facile komprenebla. La frazoj estas tute ne influitaj de nacilingvo, do pure Esperantaj”.

C. A. A. Haccou
(Djokjakarta)

EL SVEDLANDO:

“Pro la ege bona elekto de la ĉiutagaj kaj simplaj esprimoj kaj vortoj kun bildoj komprenigantaj, tiu libro estas praktikega kaj certe estas tre konvena al komenculoj”.

Johan Polgard
(Leksand)

EL BELGUJO:

“pro la multaj specialaj klarigoj kaj konsiloj ĝi iĝas modelo kaj fonto por kursestroj kaj profesoroj, kiuj deziras ekuzi la rektan metodon”.

Prof. Sielens
(Antwerpen)

Aliaj verkoj de Delfi Dalmau

“TAQUIGRAFIA CATALANA”

katalunlingva metodo pri stenografio kun Esperanta.
komparo je aliaj sistemoj — 2 ŝilingoj anglaj.

“SENY I ATZAR”

katalunlingva romano — 2 ŝilingoj anglaj.

“UNA ALTRA MENA D'AMOR”

katalunlingva romano, pri trapoŝta amo inter esperantista germanino kaj esperantista kataluno — 1 1/2 ŝilingoj anglaj.

“POLEMICA”

katalunlingvaj pristudoj pri literaturaj stiloj, internacia lingvo kaj filozofio — 2 ŝilingoj anglaj.

“DOCUMENT”

katalunlingva pristudo pri la lingva problemo en Katalunujo, — 6 pencoj.

“POLIGLOTISME PASSIU”

katalunlingva pristudo pri la homara pedagogia lingva problemo — 2 ŝilingoj anglaj.

“SINCERITAT”

katalunlingva romano — 1 1/2 ŝilingoj anglaj.

Adreso de la aŭtoro: Apartat. 5081 — Barcelona.

VENI VIDI VENKI

IMP. S. ROSÀS
Corts, 575 - BARCELONA